# KATOLIKA SENTO

72 rm



U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 51° - 1972**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

51a Jaro n-oj 9-10 Sept.+ Okt. 1972

# LA MISTERO HOMA KAJ DIA DE LA ĈIELENPRENO DE LA DIPATRINO

(Dum la Sankta Meso, celebrita la 15-an de aŭgusto en la paroka preĝejo de Castel Gandolfo, Paŭlo 6-a diris homilion pri la mistero homa kaj dia de la Ĉielenpreno de la Dipatrino. Jen la traduko de kelkaj ĉefaj pensoj)

Maria, en ĉiuj okazoj, sed precipe en ĉi tiu sia festo, instruas al ni fordoni nin kun ekstrema konfido al la mistero de la volo de la Sinjoro, ĉar Ŝi mem plene sin fordonis al la mistero, plenumante en ĉio la volon de la Sinjoro. La filoj plej proksimaj al Dio, kaj de Li plej rekonataj, estas ĝuste tiuj, kiuj akceptas Lian volon. La konkludo de ĉi tiu akcepto okazis ĉe la Kruco de Jesuo, kiam la Patrino de la Filo insultata kaj malamata de la homoj akceptis lian amo-testamenton, kiu igis ŝin por ĉiam patrino de ĉiuj homoj. Same estis Maria, kiu, kiel unua, rivelis antaŭ ĉiuj al la Apostoloj la gloron de Kristo reviviĝinta, fariĝante tiel ankaŭ patrino de la Eklezio.

Ĉio tio meritus, en la hodiaŭa tago al ŝi dediĉita, meditadon plenan de ĝojo kaj de sereneco. Sed ĉi tiuj niaj paroloj devus esti aŭskultataj en maniero tute speciala fare de la nova generacio, de la gejunu-

loj, de tiuj, kiuj vivas en kontakto kun la sperto de la mondo, en kiu ni estas aktoroj, spektantoj kaj parto-prenantoj.

Ankoraŭ nun, kiel en ĉiuj tempoj, la mondo estas frapata de la fakto, ke Maria, ĝuste pro tiu sia submetiteco de konfido kaj de amo, de doloro kaj de espero, estis revivigita kaj ĉielenprenita. Ĉi tiu estas la sento, kiu regas ĉe la kredantoj precipe dum ĉi tiu festo de la Ĉielenpreno de Maria. Ŝi estis levita al la Ĉielo kaj tie vivas flanke de sia Filo. Ĉio ĉi hodiaŭ malfermas al ni kvazaŭ strion de ĉielo kaj vidigas klare ion el la transmondo. Tio montras al ni la ĉielon kaj vidigas al ni nian destinon en vizio mirinda kaj rava.

Bedaŭrinde ni, kiuj devus teni la rigardon turnita al la ekzaltanta vido de la ĉielo, estas emaj klini la kapon al la tero en mondaj spertoj, kiuj volus igi nin mastroj de la tero. Je ĉi tiuj spertoj ni estas neniam sataj, kiel multaj riĉuloj, kiuj estas pli kaj pli alligitaj al siaj havaĵoj kaj ofte, ĝuste pro tio, mortfalas antaŭ la neracia forkuro el la vivo. Ni devas konvinkiĝi, ke ĉio, kion ni posedas, kaj kio nin ĉirkaŭas, estas nedaŭra, kaj ke en unu senkompata momento ĝi povas esti forprenita; kaj tiam, kiel estis saĝe rimarkite, restas nur "la libero morti". Ni estas, kiel diras Sankta Paŭlo, daŭraj mortantoj "cotidie morimur".

Ĉi tiu festo, krome, memorigas al ni la duoblan staton de ekzisto, al kiu ni estas destinitaj, ĉi tiun nunan kaj tiun misteran estontan. Ni havas du vivojn vivendajn: la nuna vivo estas kunligita kun la estonta kaj ĝin kondiĉas. Se ni vivas bone ĉi tie, ni havos la bonŝancon gajni la Paradizon; se, male, ni distriĝas aŭ laŭiras vojojn falsajn kaj kontraŭajn al la leĝo de Dio, kia estos nia sorto transmonda, kiam malfeliĉon ni pretigas al ni? Je ĉi tiu punkto ekaperas sus-

pekto, rimarko: sed, ĉu la miraĝo de la estonta vivo, pri kiu la Dipatrino donas al ni specimenon, ne disigas nin de la nuna vivo, ne senvalorigas ĝin? La sanktuloj estis kategoriaj pri ĉi tiu punkto, ili estis je tia malcedemo, kiu eĉ transpasas la ĝustan mezuron, kun sia malŝato kontraŭ la tera vivo, kontraŭ la aĵoj de ĉi tiu mondo. La vera vido estas tiu esprimita en la preĝo, kiun ni adresos al la Sinjoro dum la Meso; ĝi konsistas en la kapablo akordigi, kunordigi la du vivojn, la vivon nunan kun la estonta. Se ni vere komprenas, kia estas la celo, la destino de nia nuna vivo, kiun Jesuo Kristo instruis al ni kaj jam realigis en si kaj antaŭ ticipis en la Madono, la kunordigo de ĉi tiuj du vivoj ne plu estas nesolvebla problemo. Ĝi restos problemo malfacila, sed ankaŭ altira, ni povas diri, ĉar ĝi anticipas ion de la alto, la amon, la feliĉon, la esperon la ĝuon intencan, kiu morgaŭ estos ĝuo reala. Ni klopodu vivi tiel, ni vere mezuru nian nunan vivon en kontakto, en komparo kun tiu estonta. Se la Sinjoro nin vokus nun, ĉu ni estus pretaj? Kristano devus ĉiam povi diri "mi estas preta, mi estas en la graco de Dio, mi estas pilgrimanto al tiu celo, mi ne estas ekstervoje, mi estas fidela, mi estas kristana, mi faras mian devon kaj mi povas, do, kun trankvila konscienco partopreni, sen pretendemo, en la granda espero de la Paradizo, en la ĝojo, kiun ni hodiaŭ celebras, prikantante la laŭdojn de la Dipatrino".

Entute ĉio konsistas el ĉi tiuj du aferoj: ami Dion kaj ami la proksimulon. Ni estu fidelaj al ĉi tiu programo, ni vidu sinteze nian destinon. La Madono instruu al ni bone travivi ĉi tiun tagon, kiu same estas plena de donoj de la Sinjoro kaj de la Providenco. Kaj ni klopodu meti en nian koron la grandan deziron, la grandan amon, kiu estis tiu de Maria, la amon al la ĉielo.

trad. L. M.

NI MEMORIGAS NIAJN legantojn, per kies fidela subteno nia revuo sukcesis daŭrigi sian aperadon, ke jam estas taŭga la tempo de ilia nova abono por la 1973a. Ni atendas kun fido ĉi tiun signon de via aliĝo al UECI kaj de aprecado por nia laboro.

ABONINTOJ POR 1973a: Romo: G.Jacobitti; G.Fr.Barbalace; P.E.Puracchio; C.E.C.R.; St.Rejnic; Musella V. M.Macrí; Aversa:(CE) D'Amore M.; Bolonjo: Ass.It.Ferrov.E.; Carrara: F.Poli; Limbiate:(MI) F.Longoni; Milano: Eco della Stampa; Rimini:(FO) A.Ciccanti; Aŭstrujo: W.Mudrak; Britujo: Minio-Paluello L.; Ĉeĥoslovakio: 60 s-anoj; Ĉinio: El Popola Ĉinio; Francujo: Fr.Ligo Kat.E.; R.J.Marmou; M.Colleu; P.Vallée; Germanujo: H.Zimmerer; Hispanujo: De la Puente; A.Jimenez; A.O.Niqui; Hungarujo: E.Fenyvesi; P.Katona; E.Kula; M.Vadàsz; Jugoslavio; Zdenka Hag; Koreo: Jeong-Jong-Hju; Nederlando: De Boer D.; Pollando: Pola KUE.(50); Majewski St.; Pola E.A.; T.Sobiech; Entute: 138

KVANKAM NE ESTUS necese ĉijare adresi specialan alvokon al niaj romaj esperantistoj, por ke ili denove frekventu ekde oktobro niajn esperantistajn kunvenojn, ĉar fakte, ĉijare ni neniam interrompis ilin eĉ dum somero, tamen ni volas rememorigi al ĉiuj, tion. Verŝajne kelkaj el ili ne sufiĉe atentis niajn pasintajn informojn pri tio.

PRO NEPRA NEEBLECO ni ne povis prizorgi aparte la du numerojn septembro-oktobro. Pro tio ni aperigas ilin kune per numero, kompense, iom pli riĉa ol kutime.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

# LA HIDROGENBOMBO

Kian inferan maŝinon
estas do preparanta
tiu freneza krima scienculo,
moderna Faŭst' inversa,
en sia nigra laboratorio,
kiu alvokis kune
ĉiujn potencojn blindajn de la tero,
forvenkis malfeliĉojn de l' homaro,
alpremis la militon al la muro?
Tro lantaj estas la tranĉilo murda,
la kirasita kuglo humaneca,
la grenado disrompanta,
kiu detruas domojn unuope,
la abomena flamo-elĵetilo,
fajro el stoplo kaj el pajlo:
kun la terur', la fuĝo,
la postkuro peniga,
la murd' individua....
Necesas plirapidi
por bruligi, detrui, gorĝotranĉi,
malebligi la fuĝon kaj teruron,
kaj fari el la urboj cindrokvanton,
en kiu pli ne kresku eĉ herbero...
Sed kial tiu monstra fikrimulo,
eĉ traserĉante en la kor' patrina,
anstataŭ la funebran fungon radi-aktivan
por dissemi kaj morton kaj detruon,
ne laboradis por produkti
gigantan pano-radon kun la brakoj
malfermitaj samkiel horizonto,
eventuale pan' el spikoj nigraj
de la spikumantinoj

pli kurbaj ol la lun' kaj la falĉilo,
al popoloj malsataj disĵetota?
Neĝeblankan lekanton ridetantan
kun kilometre longaj la petaloj,
kiuj kaŝu la lumon de la steloj,
kaj odoron de rozo,
kiu tutan sezonon igu plena?
Ne la nub' hidrogena kaj kobalta,
alportanta la morton kaj l' ekstermon,
studita de fia scienco,
sed ondu kaj traflugu la ĉielon
l' ombro admona de pendumilego:
de ĝi malpuraj spektroj pendu
la nigraj sacerdotoj de la morto:
ligitaj dorson kontraŭ dorso,
al ili sin ĵetu la fulmoj
je milda kolor' de verbeno
de la someraj ŝtormoj
kiel fajraj vulturoj
por dise ŝiri la kruelan koron
kiel karnon de rabiaj hundoj...
Ho Jesuo, alnajlita sur l' arbo mortigita
kiel la reloj sur la ŝpaloj,
sur kiuj pasos estonte la trajnoj
en la dezert' ebena pro l' eksplodo,
papave sangigante
vian nudan bruston;
faru, ke neniu povu iam diri:
"Ĉi tie ĝis la horizonto
kuŝis granda urbo
kun virinoj kaj kun infanoj,
kun floro el lumo,
repuŝanta la nokton:
ĉi tie estis riverego

kiel la pordvejno de l' koro,
ĉi tie templo, ludherbejo tie,
kie lupopaŝe nun la vento
venas flari suspekte morton kaj detruon
kun forta koro plena de timsento".
Faru, Jesuo, ke neniam pasu novaj trajnoj
sur via nuda brust' papavoplena,
alnajlita kaj sternita sur ligno
kiel la ŝpaloj de la trakoj.
Ho Jesuo, descendu de la muro
antaŭ ol estos tro malfrue;
kaj iru tra la mondo
kun via kruco kiel lambastono,
kun la najloj ardantaj je via sango,
kun surŝultre la garbo de la ŝnuro
por la krucumado,
piedkune saltetante en la koto de l'mondo
kiel la birdetoj de l' ĉieloj
antaŭ ol pasos la novaj trajnoj
sur via kor' najlita ĉe la reloj!
Se ni devas formorti
ni volas vidi frunte la murdistojn...
Ni scias ja tro bone,
al kio celas la Ho-bombo.
Kun komplica ĉielo
ĝi celas, ke oni aŭdu plu
dum la buĉad' farita fulmrapide,
nek la ĝemojn de la bruligitaj nestoj,
nek la ploron de la infanoj,
nek de l' patrinoj terurfrenezaj la kriojn...
Ni ne volas perei
sen rikani ĉe l' frunto de l' murdistoj.
Ĉe l' horizonto estas jam l' obskuro...
Jesu', malsupreniru tuj de l' muro!

Roma, aprilon 1954ª Corrado Govoni
el la itala trad. Luigi Minnaja

ROMA ESPERANTA VOĈO

n-oj 109-110

IKUE-KUNVENO EN PORTLANDO okazis en la kadro de la U.K. la 1-an de aŭgusto, sub prezidanteco de P.A.Ciccanti, kun la ĉeesto de 27 personoj el 12 landoj. Oni parolis interalie pri la mozaiko de Nazareto, kolektante iom da mono. La katolika diservo okazis en la katedralo Sankta Maria per kuncelebrado de la diverslandaj pastroj, kun ĉeesto de 220 personoj. Pri alia meso por la esperantista geedziĝo ni jam parolis en la 8a numero (p.175a).


OKAZE DE LA 40a internacia kongreso de la blindaj esperantistoj (19-30) de aŭgusto) en Rimini celebris la meson la unuan fojon, dimanĉe la (20a-IX) p.A. Duranti, direktoro de"Biblia Revuo"; je la dua dimanĉo (27a -IX) P.A.Ciccanti ĵus reveninta el Portlando. Pri tiu kongreso anoncis dufoje ankaŭ la vatikana ĵurnalo "L'Osservatore Romano".

---

## El la Katolika Eklezio

---

PILGRIMADO AL LURDO (Lourdes) de tri mil romaj fideluloj ekveturis la 25an de aŭgusto, gvidata de kard. Angelo Dell'Acqua, vikario de la papo por la roma diocezo, kun tri episkopoj, ĉirkaŭ 400 sacerdotoj, kaj multaj grupoj de fratinoj el pluraj religiaj kongregacioj de Romo. Laŭ la programoj, dimanĉe,



la 27an de aŭgusto okazis la unua solena kuncelebrado en la baziliko de sankta Pio 10a, dum kiu la kardinalo adresis al la amaso homilion en la itala kaj en la franca lingvoj. Posttagmeze okazis la eŭkaristia procesio kun la beno al la malsanuloj, kaj vespere la dua procesio "aux flambeaux" (kun la torĉoj). Sed dum la rava manifestacio de la du longaj lumostrioj de la procesi -

antoj laŭ la deklivoj konverĝantaj al la du bazilikoj, la kardinalo, kiu ripetadis emocie mallaŭte al si mem : "Kia spektaklo de kredo!", abrupte trafite de infarkto, terenfalis, kaj mortis post kelkaj minutoj. Neniu tuja helpo taŭgis. Dolora konsterno prenis ĉiujn ĉeestantojn, kiuj la tutan tagon estis kun li, tiel vigla kaj senlaca, afabla kun ĉiuj, animo de la tuta pilgrimado. Sed verŝajne li mem ne povis deziri pli belan kaj gloran vivofinon, en la lando de Maria, Lurdo, de li tiel amita, en la servo al la eklezio, al Maria, kaj al sia komisiita grego! La papo mem informis la roman klerikaron kaj fidelularon pri lia forpaso, per letero, per kiu li volis asocii ĉiujn al sia ĉagreno kaj al siaj propetaj preĝoj, sed ankaŭ al konsolo, kiu venas de la kristana espero; kaj je la 31a de aŭgusto li mem, kun la episkopoj vic-administrantoj de la urbo kaj kelkaj reprezentantoj de la roma klerikaro, celebris la funebran meson en la baziliko de S. Johano.

KIAM KARD. JULIO DOEPFNER inaŭgure de la 20a serio de la Olimpiaj Ludoj en Munkeno, celebris solenan episkopan diservon, li legis mesaĝon de la papo, kiu, salutante la atletojn, rimarkigis, kiom povas la korpo firme estrata de la spirito. Kaj la papo aŭspiciis, ke ankaŭ en la internacia kunvivado kaj en la rilatoj inter la popoloj, ĉefaj estu kaj de ĉiuj agnoskataj la spirita digno kaj la ne rezigneblaj valoroj de la homa persono, ilia bazo; kaj ke tiuj altegnivelaj sportoj, pere de kunaj, intensaj strebadoj, estu kontribuo al tutmonda interkompreno, socia justeco kaj mondpaco. En la alparolado al la kredantaro, kiu alfluis al Castelgandolfo la 28an de aŭgusto, por lin aŭskulti, la papo, deklarante ke li ankaŭ rigardis la inaŭguron de la olimpiaj ludoj per la radio "altirite pli de la homa aspekto de la mirinda spektaklo, ol de ĝia estetika grandeco", levis himnon al la juneco: "Sana, forta, vi-

gla kaj bela junularo; junularo, kiu revivigas la antikvan formon de la klasika humanismo, ne superebla pro eleganteco kaj energio; junularo ravita per sia ludo, per la plezuro de memcela agado, libera de la avaraj kaj severaj porgajnaj leĝoj de la kutima profesia laboro; junularo diversracia kaj kompakta el ĉiuj mondpartoj, lojala kaj gaja eĉ en la plej diversaj sportludoj, kiuj celas produkti, ne ofendi amikecon; junularo, kiu prezentas bildon kaj vekas aspekton de nova kaj ideala mondo, kie frateca kaj harmonia sento ekvidigas pacon ne nur eblan, sed efektivan kaj agantan en la komuna respekto kaj en la konkorda konkuro al pli kaj pli bonaj atingoj. Saluton al vi, junularo! Leviĝis tiuj vortoj el mia animo kune kun la bondeziroj;kaj ni konfidis tiujn al la spiritaj ondoj, kun la spontana kaj kaŝita impulso malfermi dialogon kun tiuj mirindaj junaj aroj. Ĉu vi estas feliĉa junularo?- demandis la papo- . Kaj li pludiris: Ni aŭskultis la respondon: jes , ĉar ĝi estas supreniranta. Kuraĝon, do, kaj antaŭen! La korpo estas ja en sia plena efikpovo, sed regata de la energio de la spirito. Kien celas la spirito? "Excelsior", pli kaj pli alten! Sporto devas esti impulso al la pleneco de l' homo; celo sin superi, por atingi pli altajn nivelojn de tiu homa naturo, al kiu ĝi agnoskis ne senmovan, kvazaŭ statuan ekvilibron, kontenton pri si mem, sed aspiron, ambiciantan al iu integra perfekteco, pri kiu la sporto mem revekis deziron. Ĝi ne estas la tuto de vivo; ne estas mensufiĉa realo; ne estas iu religio. Sed ĝi estas ŝtuparo, kiu povas tien konduki. Kaj ĝi tien aspiras verŝajne ne ĉiam plenkonscie. Aŭskultu la freŝdatan ateston de iu fama vivanta sportulo, Eddi Merckx: "Kristo por mi daŭre estas ĉeestanta en la tuta mia vivo. Mi profunde kredas je li, je lia historia realo, je lia dieco". Ankaŭ por la sportuloj - konkludas la papo - eĉ ĉefe por ili, Kris -

to estas la vivo".

Post tiaj altaj homaj kaj religiaj sentoj, kiom konster-ne trafis la koron de ĉiuj, la sciigoj de la eksterma farita pro kelkaj frenezaj gerilistoj kontraŭ la izraela teamo, kaj, laste, kontraŭ si mem! Komence de la ĝenerala aŭdienco de la 6a de septembro, malmultajn horojn post la kruela misfaro, la papo esprimis sian profundan dolorsenton kaj kondamnon: "Ni malaprobas ĉi tiun fakton, kiu vere malhonoras nian epokon, epokon kiu celis pacon kaj fratecon; fakto, kiu okazis ĝuste kie kaj kiam oni solenis la homan fratecon... La elverŝo de homa sango ĉiam malĝojigas kaj mallogas. La tragika epizodo portis konsternon dum bela, juneca, sporta sceno, kiun oni celebris kun tiom da ordo kaj tiom da animstreĉo en la tuta mondo. Ni rigardu ankaŭ malproksimen- sed ne ekster la eblaj antaŭvidoj, kiujn ĉi tio havas en la mondo. Tio ne estas epizodo, kiu restas izolita. Ĉiuj spektantoj - milionoj - disigitaj sur la tero, estas spirite vunditaj de ĉi tiu ne komprenebla kolizio. Dio volu, ke ne okazu aliaj similaj epizodoj, kiel bedaŭrinde estas eble, kaŭze de la homa malforteco. Fakte malamo produktas malamon; sango postulas sangon; venĝo, venĝon. Kien ni iros?..."

Kun emociaj vortoj la papo apelacias al boneco, al amo, al pardono: pardono inter homoj, pardono de Dio. La antaŭvidoj de la papo bedaŭrinde fariĝis realaĵo: la israelanoj trafis per teruraj bombardadoj arabajn militajn instalaĵojn, kaŭzante siaflanke multe pli grandan nombron da viktimoj. Ankoraŭfoje leviĝis la vorto de la papo, je la 10a de septembro, patrece admonante ĉiujn: "Sen sincera justeco oni ne konstruas veran ekvilibron, lojalan kaj stabilan konkordon inter nacioj kaj inter sociaj klasoj; venĝo ne estas rimedo, sed malbono, kiu emas ripetiĝi kaj vastiĝi senmezure; terorismo estas abomenindaĵo inter civilaj gentoj: ĝi trafas senkulpulojn kaj detruas fidon pri la paca kunvi-

vado; kolizio neniun obstaklon forigas, eĉ ĝi povas fariĝi danĝero kronika kaj progresiva ; la vorto lojala kaj saĝa devas esti la preferata metodo, por pritrakti interhomajn kontraŭstarojn; kiel same justeco, arbitracio, grandanimeco, reciproka pardono, respekto al honoro, estas la plej taŭgaj rimedoj por solvi konfliktojn".

EN LA 23a ITALA liturgia semajno, kiu fermis siajn laborojn la 2an de septembro en Bergamo, prelegis inter aliaj Mons. Balthasar Fischer pri la reformo de la sanktoleada rito. Ĉar la parolanto, kiu apartenas al la liturgia instituto de Treviro (Germanujo), estas ankaŭ membro de la Sankta Sideja Komisiono por la reformo de la rito de la malsanula unktado, liaj vortoj estas sendube laŭaj al la respondecaj fontoj. La unua parto de lia prelego estis dediĉita al la remalkovro de la origina senco de la rito, la dua al la reformo de la Sakramento, kaj la tria al la paŝtista sekva efiko. Li asertis, ke la tago, en kiu tiu sakramento estos fine restrukturata, estos prikonsiderata de la estontaj generacioj kiel historia dato, pro la impulso kaj la nova progreso, kiujn ricevos la pormalsanula paŝtista zorgo. Kvankam la Tridentina Koncilio jam rifuzis la limigan koncepton, ke la sankta ŝmiro estas destinata "nur" al malsanuloj, kiuj troviĝas en grava mortdanĝero, deklarante pli prudente, ke ĝi devas esti donata al malsanuloj kaj "precipe" al tiuj, kiuj troviĝas en tiaj kondiĉoj, kiujn oni povas opinii kiel ekstremajn, tamen la mezepokaj devojiĝoj pri tiu sakramento, nome, ke ĝi devas esti liverata nur al mortiĝantoj, daŭris preskaŭ mil jarojn. Oni povis ankoraŭ dum longa tempo legi eĉ en oficialaj ritlibroj, ke la malsanula unktado povas esti donita nur "in articulo mortis", en la momento de la morto. Vere nekompreneble, diris mons. Fischer, ĉar ĝi estas klara kontraŭdiro al la teksto

de la Letero de S.Jakobo, kiun ĉiuj katolikoj agnoskas klasika pri ĉi tiu sakramento, kaj en kiu oni neniel parolas pri mortiĝantoj: kaj ĉi tio kontraŭstaras ankaŭ al la liturgiaj tekstoj, kiuj neniam travidigis tiun koncepton. Alia argumento kontraŭ tiu koncepto reliefiĝas el la "Roma katekismo" kiu ekskludas tiujn, kiuj estas, ja en mortdanĝero, ne tamen pro malsano, kiel militistoj, kiuj antaŭvidas certan morton el batalo, kaj eĉ mort - kondamnitoj. La Dua Vatikana Koncilio klare asertis, ke la lasta oleado, prefere estas dirita malsanuloleado; fakte en la aliaj konciliaj dokumentoj la esprimo "lasta oleado" ne plu troviĝas. La Koncilio instruas, ke "la oportuna tempo por ricevi la oleadon certe jam ekzistas kiam la malsanulo, pro malsano aŭ pro maljuneco, komencas esti en danĝero de morto". Post preskaŭ mil jaroj la latina eklezio revenas al la origina koncepto de la pormalsanula sakramento, kaj ĉi tiu fine respondas al la liturgio, kiu dum jarcentoj estis fidela atestanto pri tiu senco. Tiel, aldonis mons.Fischer, oni agnoskas al ĉi tiu evoluo ankaŭ ekumenan sintonizon;la kristana Oriento neniam malproksimiĝis de ĉi tiu aŭtentika koncepto pri la Sakramento de malsanuloj; la anglikana eklezio jam de 1935a reenkondukis "libervole" la liturgian praktikon de la sankta ŝmiro, kaj aliaj protestantoj en Germanujo same revenis al ĉi tiu rito,kiun dum tiom da jarcentoj oni konsideris superstiĉa. Rilate al la celebra restrukturado de la sakramento, mons. Fischer parolis pri la formulo kaj pri la korpopartoj, sur kiuj la oleado estas praktikata. En la nova formulo reakiras valoron la tri efektoj indikitaj en la Letero de S.Jakobo, 5:13 k. sekv.(la preĝo savos la malsanulon, la Sinjoro relevos lin, liaj pekoj estos al li pardonitaj) kaj unue reaperas tiu dimensio, tiel longe flankemetita, de la konsola forto, kiu malpezigas la animon. Oni prijuĝis krome, ke ne plu estas necese apliki la for-

mulon tiel retuŝitan al ĉiu sensorgano. Oni disponas, ke oni povas fari nur du unktadojn, unu sur la frunto kaj alian sur la manplatoj, kiel por signifi, ke la efiko de la sakramento etendiĝas el ĉi tiuj du ŝmiradoj al la tuta korpo. Aliaj sekvoj de la reveno al la origina koncepto de la oleado estas: ebleco doni tion longe antaŭ la viatiko; doni ĝin ankaŭ al infanoj kun tia rezonkapablo, ke ili kapablu percepti neceson de la konsolo de la Sakramento; ebleco ricevi tion dum la meso ne nur celebrata en la hejmo de la malsanulo, sed ankaŭ en la preĝejo, kun partopreno de la komunumo. Fine la reenkonduko de la surmeto de la manoj sur la kapo de la malsanulo, tre antikva rito, sanktigita per la ekzemplo de Jesuo mem kaj plene responda al la psikologio de la malsanulo, kiu ofte timas esti konsiderata kiel netuŝeblulo. En la lasta parto de sia prelego, mons. Fischer donis kelkajn principojn pri la paŝtistaj eblecoj, malfermitaj per la nova rito. Oni devas eviti la esprimon "lastega ŝmirado, aŭ oleado", por ke la esprimo ne kontribuu al daŭrigo de falsa koncepto pri la Sakramento. La ekzakta esprimo devus esti "malsanula oleo aŭ unktado de la malsanuloj". La rito de la unktado ankaŭ ekster la lito kontribuos forigi la teruran mallogon, kiun multaj provis antaŭ ĉi tiu Sakramento kaj montri ĝian konsolan frukton. Oni devos uzi ĉiujn modernajn paŝtistajn rimedojn por informi la fidelulojn pri la vera senco de ĉi tiu Sakramento, per homilio kaj katekezo ĝis disdono de flugfolioj ĉe la pordo de la preĝejo kaj en la hospitalaj ĉambregoj. Fine, admonis mons. Fischer, kiam oni celebras ĉi tiun Sakramenton, oni invitu partopreni en ĝi la aliajn membrojn de la familio.

AL DEMANDO, ĉu estas permesate komuniiĝi pli ol unufoje en la sama tago, mons. Ferdinando Lambruschini, kompetentulo pri la faktemo, respondis: "La demando estas multe pli kompleksa, ol ĝi ŝajnas. Nece

-sas fakte rigardi al la plej ĵusaj liturgiaj dispozicioj kaj al la teologaj-paŝtistaj aspektoj de la komunio,celita kiel plej efika partopreno en la meso sub la duobla senco de ofero kaj de spirita nutraĵo. La fidelulo j laikaj kaj ankaŭ reliĝiaj ne investitaj pri sacerdoteco, laŭ la vidpunkto strikte liturgia-kanona nun observenda, povas ripeti la komunion nur okaze de la mesoj por la konsekro de Krismo kaj en la celebro rememore de la lasta vespermanĝo en la sankta ĵaŭdo ; en la mesoj de noktomezo kaj de la Kristnaska tago , kaj fine de la antaŭtago kaj je la Paska tago. Tamen oni konsentis jam en la normo, ke ili povas ricevi la komunion dum la vespera meso de la sabato, kvankam ili jam ricevis tion matene, kaj antaŭvidas alian komunion dum la festa meso de la sekvanta tago. Ankaŭ la religiaj kutimoj disvastiĝas rapide nuntempe, precipe pere de turismo. Se tamen oni partoprenas al du eŭkaristiaj celebroj en la sama tago sed en diversaj horoj, aŭ ankaŭ al unu matene kaj al alia vespere,laŭ la aktuala disciplino, ne estas permesate ripeti la komunion. Intence ni uzis ĉi tiun rezervon, ĉar ni konscias, ke oni povus trovi plurajn rajtigojn laŭ la teologia kaj la animzorga vidpunktoj. La meso estas ofero, en kiu partopreno en la eŭkaristia bankedo estas laŭ la invito de Kristo: prenu kaj manĝu; prenu kaj trinku vi ĉiuj. Jam la patroj de la Tridentina Koncilio, kvankam ne akceptis la opinion de multaj kaj gravaj teologoj, kiuj metis la esencon de la meso en la komunion, instruis, ke la sankta eŭkaristio estis donita por esti manĝata. La koncilia Konstitucio pri la sankta liturgio (n. 55) kaj la Instrukcio pri la eŭkaristia mistero (n. 31) klarigas, ke la komunio de la fidelularo, ricevita post tiu de la celebranto, prefere per hostioj konsekritaj en la sama meso, al kiu oni ĉeestas, konsistigas pli plenan partoprenon en la san-

kta ofero. El ĉi tio oni povus logike dedukti devon aŭ almenaŭ rajton komuniiĝi ĉe ĉiuj mesoj, en kiuj oni partoprenas. Fakte tamen la eklezio devigas nur la sacerdoton plenumi la sanktan oferon per komunio, ĉiufoje kiam li celebras duan aŭ trian meson en la sama tago je servo de la fratoj. Ĉe kelkaj kazoj la sacerdotoj estas rajtigitaj, ne devigitaj, komuniiĝi, partoprenante en kuncelebrado, kvankam ili jam private celebris pro paŝtistaj motivoj. Tiuj teologiaj-paŝtistaj konsideroj ŝajnas evidentaj kaj nediskuteblaj, koncerne rajtigon de plurfoja komunio en la sama tago. Tamen ni estas nepre kontraŭaj pri tio, ĝis oni ne havos el la kompetenta aŭtoritato tiun deklaron, kiun multaj atendas. La konsideroj menciitaj havas sian gravecon, sed ne malpli grava estas unuformeco de la liturgia disciplino, por malpermesi trouzojn facile antaŭvideblajn. Personoj malpli ekvilibritaj povus esti kuraĝitaj pasigi la tutan tagon, partoprenante en sanktaj mesoj, por ripeti samnombrajn komuniojn. La ebleco de tiaj trouzoj estas sufiĉa, por kompreni la neceson de la limigoj, kiujn la eklezio decidis pri la komunio.

DE LA SANKTA SIDEJA KONGREGACIO por la Dia Kulto estis publikita la volumo "Ordo Cantus missae", kiu enhavas la novajn dispoziciojn, pretigitajn de la roma kongregacia sekcio pri la kantoj, kiujn oni uzos en la meso en la latina lingvo kaj en la gregoria ĉanto. La revizio de la roma gradualo estis necesa post la reformo de la kalendaro, de la mesalo kaj de la liturgia legaĵaro. La nova kolekto estis farita konforme al la konciliaj preskriboj, kiuj volis, ke la riĉeco de la gregoria ĉanto estu gardata kaj uzata. La volumo priskribas la manieron por efektivigi la ĉantojn en la meso kaj ĉies celojn; donas la melodiojn por la novaj mespartoj kaj indikas la tekston de la ĉantoj por la jartempo, la propraj kaj la komunaj partoj, la votaj mesoj, ktp. Tiel

la tuta aŭtentika gregoria riĉeco estas denove valorigata, kaj oni reaktualigis ankaŭ komponaĵojn forgesitajn. Ĉiu aŭtentika kanto estis redonita integre, sen ŝanĝoj, aldonoj aŭ deprenitaĵoj. Al la novgregoriaj melodioj, enkondukitaj ĉefe por la festoj de sanktuloj, estas preferataj la malnovaj, kvankam ambaŭ povas esti uzataj. P.Claire, de la Solesmaj benediktanoj, kiu kunlaboris en la reordigo, klarigas: "La nova dispozicio pri la kantoj de la meso indikas la pecojn, kiujn oni devas uzi nur en la mesoj gregorie ĉantitaj. En ĉiuj aliaj mesoj, en la latina aŭ en alia lingvoj, devas esti uzitaj la tekstoj de la mesalo kaj de la legaĵaro: ĉi tiuj estis elektitaj por anstataŭj la antikvajn, kies tradukoj povis ŝajni tro malriĉaj laŭ la paŝtista vidpunkto. Temas pri tiuj novaj tekstoj, kiujn neniam havis gregoriajn melodiojn, kiuj devos esti komentitaj kaj ornamitaj per la nuntempa muziko". Per la publikado de la "Ordo cantus Missae", pludiras p. Claire, oni konkludas la revizion de la meso, ordonitan de la Koncilio: kie la meso estas gregorie ĉantata - laŭ la tradicia ĉanto de la roma eklezio - ĝi havas jam nun internan unuecon, pli riĉan variecon,pli grandan facilecon por la ĉantistoj kaj plian muzikan intereson".

KELKAJ DIOCEZOJ ESTAS eksperimentantaj prokraston de ordiniĝo de ĉiuj teologaj studentoj, kiuj plenumis sian kurson. Oni decidis, ke ĉi tiuj restu diakonoj kaj estu sendataj portempe tien, kie necesas diakona agado, laŭ juĝo de la pastra konsilio, tielke ili kapablu ekzameni pli bone siajn dispoziciojn, rilate al sia vokiĝo, kaj por ke ankaŭ la fidelularo rekonu en ili la necesajn kvalitojn. La tuta eklezio konstatas,ke la delego, kiun episkopo, sacerdotoj kaj popolo donas al la seminariaj superuloj, estas tro elmetita al riskoj, ĉar mankas ofte al tiujsuperuloj la kono de la medio,

en kiu la estontaj sacerdotoj troviĝos. Cetere, kapableco por sacerdotiĝo ne samsignifas kapablecon por gvidi lokan eklezion. Fakte, pli kaj pli nombraj estas la sacerdotoj junaj kaj malpli junaj, kiuj petas esti malligitaj de la sacerdota vivo, pro tio ke, laŭ ili, lasante la seminarion, ili ne sufiĉe estis konsciaj pri ĉiuj postuloj de la nova medio. Dum la diakona vivo la junaj teologoj povos provi sin mem, sperti konkrete, ĉu ili estas taŭgaj por la sacerdota vivo, kaj por ĉiuj ĝiaj devoj. Kiam, tiel maturiĝinte, ili petos sacerdotiĝon, ilia agado estos sendube multe pli konscia kaj garantiita. Samtempe sacerdotoj kaj fideluloj, per tiu sentotiel sagaca, per kiu ili perceptas aŭtentikecon de sacerdota spirito, kapablos konfirmi kiel justan kaj akceptindan la peton de ordinotoj. Tiel la opinio, kiun la episkopo petas de la asembleo pri la indeco de la kandidato, ne plu estos nur simbola agado, relikvo de antikva realo, sed reveno al tiu origina normo decidi kune en asembleo, sub la Sankta Spirito, pri konata objekto. Kajpor ke ĉi tio estu eĉ pli efika, oni povos asigni la junajn diakonojn al tiuj samaj lokoj, kie probable ili devos dediĉi siajn estontajn pastrajn devojn. Kiam ili devus daŭrigi komplementajn studojn, ĉi tiuj ne devus malpermesi paŝtistan agadon. Laŭ la plano, tiuj diakonoj devus havi la samajn rajtojn kaj devojn de la junaj sacerdotoj vicparokestroj. Temas pri novaj vojoj, kiujn oni devas atente esplori, pri kiuj oni ne povas plene antaŭvidi longecon kaj kurbiĝojn, avantaĵojn kaj riskojn. Kaj samtempe tio eble klarigos pli vaste la rolon de la permanenta diakoneco.

DENSA GRUPO DA UKRAJNOJ, venintaj de Kanado, Britujo, Usono, Belgujo, Francujo kaj Germanujo, kunvenis en Romo la 26an de aŭgusto, por omaĝi kard-on Slipyi, okaze de lia okdeka vivojaro. Inter ili estis ankaŭ bando da muzikantoj, du ĥoroj kaj unu kapelo, reve

nintaj de festivalo en Britujo, kiuj, en la roma ukrajna seminario honoris la kardinalon per sugestiaj muzikoj kaj kantoj. La sama grandioza ukrajna grupo, kiu estis gvidata de la eparkiestro de Toronto de la Ukrajnoj (Kanado), mons. Isidoro Borecky, kun kelkaj sacerdotoj ukrajnritaj kaj kun reprezentantoj de la ukrajna roma komunumo, inter kiuj la rektoro de la papa ukrajna mezgrada seminario, Dom Bazilio Sapelak, benediktano, estis ankaŭ akceptata aŭdience de la papo.

SEP TEKNIKISTOJ DE LA VATIKANA laboratorio pri sciencaj priserĉadoj, laboras intense por la "Pietà" de Mikelanĝelo, per dokumentado, katalogado, fotografado, elekto, rekonstruado de ĉiuj grandaj kaj malgrandaj fragmentoj. Prof. Redig De Campos, direktoro de la Vatikanaj muzeoj, diris, ke li esperas, ke por Kristnasko la restaŭro estos plenumita. Kvankam temas pri laboro laŭ kartuziana pacienco, ĝi jam donas bonajn fruktojn. Ankaŭ la riparo de la palpebro de la Virgulino, kiu kaŭzis la plejn grandajn zorgojn, ne prezentos esceptajn malfacilaĵojn, ĉar ĝia fragmento estis retrovita integra. Multaj proponoj kaj konsiloj alvenis de pluraj personoj: pli ol cent. Ĉiuj estis atente analizitaj, sed la definitiva solvo apartenos verŝajne al speciala mastiko pretigita de la teknikistoj mem de Vatikano.

EN AŬSTRUJO ekzistas 13.574 religiulinoj kun 1033 religiaj domoj. 80 procentoj el ili estas por la servo de la popolo. Preskaŭ 6.300 fakte laboras en asistaj kaj sociaj organizoj; 1387 sin dediĉas al instruado en lernejoj kaj 3480 helpas en hospitaloj. La klaŭzuraj monakinejoj estas 33, kun sume 604 kontemplaj religiulinoj.

WALSINGHAM ESTIS EN BRITUJO antaŭ la Reformacio (16a jarcento) pilgrimloko, tute simila tiutempe al S. Jakobo de Kompostelo, kaj hodiaŭ al Lurdo aŭ al Fa-

timo. Malcerta estas ĝia origino. Jen kiel oni rakontis ĝin. Kastelanino de Walsingham, Richelde de Fervaques, ricevis vizion, kiu ripetiĝis trifoje. La Madono montradis al ŝi la domon de la sankta familio de Nazareto, ordonante, ke ĝi estu reproduktita. Richelde obeis, kaj tiel en la graflando de Norfolko, antaŭ ol en Loreto, aperis iu "sankta domo", kiu estis, oni diras, simila al la sama de Loreto. Oni starigis tie statuon de la Madono; oni konstruis tie preĝejon, kaj por la gardo de la kulto aldoniĝis monakejo, kiu poste estis transdonita al agostenanoj. Komenciĝis pilgrimadoj, kiuj prosperis pro la multaj gracoj ricevitaj. Popolamasoj kaj reĝoj iris tien, por kulti la misteron de la enkarniĝo. La sankta reĝo Eduardo vizitis ĝin dek tri fojojn. Ankaŭ Henriko 4a, komence de sia reĝado, pilgrimis tien kun sia edzino. La princo de la humanistoj, Erasmo de Roterdamo, vizitis la sanktejon en 1512a. En la rakonto, kiun li skribis pri tio, li konigas al ni la saluton, kiun li per sia bela latina lingvo, adresis al la Virgulino: "Ho unika inter ĉiuj virinoj patrino kaj virgulino, tre feliĉa patrino, tre pura virgulino, ni malpuraj salutas vin, ho pura; ni vin honoras laŭ nia povo, per niaj humilaj donacoj. Donu al ni via Filo kaj nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke ni, imitante viajn tre sanktajn ekzemplojn, meritu spirite lin koncipi, per la graco de la Sankta Spirito, kaj ke, akceptinte lin en nian animon, ni ne plu perdu lin". Sed post ne longe Henriko 4a ŝanĝis sian vojon kaj detruigis la sanktejon de Walsingham. La statuo de la Madono estis transportita al Londono, kaj tie, laŭ ordono de la reĝo, bruligita. Tiel restis la aferoj ĝis nia jarcento. En 1922a, ĝuste antaŭ kvindek jaroj, anglikana pastro, kiu portis esperon en sia nomo, Hope (=Espero) Patten, parokestro de Walsingham, volis redoni al la Virgulino la rangon, kiun ŝi havis en la angla eklezio antaŭ la Reformacio. Li metis en sian pre-

ĝejon statuon de Maria, similan al la antikva, kaj lerte instruis siajn parokanojn, montrante, ke la devoteco al Maria estas ne nur laŭdinda, sed ankaŭ necesa por la kristana kredo. Opozicioj ne mankis. Ili venis de la falsa opinio, ke la kulto donita al Maria forprenas tiun, kiun oni devas nur al Dio, kaj ankaŭ de la tradicio de la oficiala eklezio kaj de la rezervoj faritaj de la episkopo. Patten defendis sian rajton kun respekto, sed kun firmeco. Lia entuziasmo komunikiĝis. Li trovis personojn pretajn helpi lin kaj monon por rekonstrui la Sanktan Domon. La statuo de la Madono havis sian kapelon. La parokanoj estis feliĉaj. Sed Patten rigardis antaŭen trans la limoj de sia paroko. Pilgrimadoj estis organizitaj kaj floradis. En la loko de la monakejo de la aŭgustenanoj, la parokestro kreis kaj kunigis grupon da gardistoj de la kapelo, ekleziuloj kaj laikoj. La ekleziuloj observas celibatecon. Iun tagon, dum li gvidis grandan pilgrimantaron, en la 1958a, la koro de Hope Patten abrupte mankis (kiel tiu de kard. Dell'Acqua!), kaj li mortis, ĉirkaŭata de episkopoj kaj de la gardistoj de la sanktejo. Unu el ĉi tiuj, Canon Colin Stephenson, kiu direktis parokon en Oksfordo, prenis lian lokon. Post dek jaroj li ankaŭ estis anstataŭita, sed jam li kapablis plibonigi la rilatojn de sia episkopo al sia sanktejo; kaj tio permesis ĉijare festi ĝian jubileon. Fakte la episkopo de Norwich multe kontribuis al la brilo de la celebroj. Estinte mara kapelano, lin akompanis taĉmento de militmaristoj, kiuj eskortis lin inter la aplaŭdoj de la popolo. Li aŭtoritate parolis, laŭ la temo de la vortoj de Maria, okaze de la nupto en Kana: "Faru ĉion, kion li diros al vi". "Ĉi tiuj vortoj konsistigas tion, kion oni povus nomi la evangelion laŭ la tre sankta Virgulino. La ĝusta vojo de la devoteco estas indikita per la Sankta Skribo, kiu instruas nin, ke ŝi, patrino de Jesuo, Filo de Dio kaj nia Savanto, liajn vor-

tojn gardis en sia koro, liajn ekzemplojn ĉiam admiris, lian volon obeis". La episkopo menciis la Duan Vatikanan Koncilion, kiu fondis la kulton al Maria en la konfeso de la dieco de Kristo kaj en la sindono al li. Estas ĝuste la kredo je la dieco de ŝia Filo, kiu inspiris al Maria la admonon: "Faru ĉion, kion li diros al vi." La mistero de la enkarniĝo, fundamento de la kristana kredo, en Walsingham kiel en Loreto, en Lurdo kiel en Fatimo, kiel en ĉiuj mariaj sanktejoj, inspiras kaj gvidas la devotecon al la patrino de Dio. En ĉi tiu jubilea jaro la tradicia procesio en Walsingham disvolviĝis kun escepta soleno. La statuo de Maria estis portita de la paroka preĝejo, kie estis montrita por la festo, al la kapelo, kie ĝi estas honorata. La maristoj estis la honora gvardio de la Madono; ok mitritaj episkopoj iris post la muzika bando de "Fakenham Salvation Army"; longa vico da klerikoj, inter kiuj grupo da negraj seminarianoj defilis kun blankaj surplisoj. Ĉeestis ortodoksoj, kiuj venis kun siaj pastroj el la greka londona katedralo. La gardistoj de la sanktejo portis siajn bluajn mantelojn. Flanke de la anglikana parokestro troviĝis ankaŭ P.R.W. Connolly, la parokestro de la katolika preĝejo, kie la katolikoj honoras la saman statuon de Nia Sinjorino de Walsingham.

LA ANGLA REĜISORO Alec Guinnes konvertiĝis, kiel sciate, al katolikismo kaj baptiĝis en Londono. Lia konverto okazis pro miraklo, almenaŭ laŭ tio, kion li mem deklaris. Por Alec Guinnes, fakte, ne estas dubo, ke la resaniĝo de la filo Mateo sukcesis pro liaj fervoraj preĝoj. Trafita de poliomjelito je la aĝo de kvin jaroj, la knabo restis paralizita. Alec Guinnes sin turnis al la plej famaj specialistoj en la mondo, sed neniu sukcesis travidigi al li esperon pri resaniĝo. Ĉiuj kuracadoj estis provitaj kaj reprovitaj, sed ĉiam vane. Dum la laboroj en Romo por la filmo "Corilona", la angla reĝiso-

ro pasis hazarde ĉe preĝejo, kaj inspirite per interna impulso, kiun li opinias dia inspiro, eniris preĝi. Ankaŭ dum la sekvaj tagoj li daŭrigis siajn preĝadojn por la resaniĝo de la filo. Revenante al Londono, kia surprizo! Lia filo atendis lin en la flughaveno, ankoraŭ en veturebla brakseĝo, sed kiun li vigle manovradis per si mem. Post kelkaj tagoj Mateo kapablis piediri. Li definitive resaniĝis. La kuracistoj, kiuj reekzamenis lin, sin deklaris ne kapablaj klarigi la abruptan resaniĝon.

KARD. JOHANNES WILLEBRANDS, prezidanto de la Sekretariato por la Unuiĝo de la Kristanoj, iris al Utrecht je la 22a de aŭgusto, por vizito al la Tutmonda Konsilantaro de la eklezioj (CMC). Lin akompanis kard. Bernard Jan Alfrink, ĉefep. de Utrecht kaj primato de Nederlando. Ambaŭ estis akceptitaj de la prezidanto de CMC, pastoro Thomas. Kard. Alfrink deklaris, antaŭ la asembleo, ke la unueco de la kristanoj estas ordono de Kristo al ĉiuj eklezioj, kaj ke tio, en mondo pli kaj pli minacata de morto kaj perforto, fariĝas imperativo. Siavice kard. Willebrands sin diris feliĉa ĉeesti asembleon, kies ĉefa celo estas unueco. La purpurulo konstatis kun plezuro la interkomprenan agadon inter la katolika eklezio kaj CMC, reliefigante la kunlaboron pri tio, kio rilatas la pacan kaj evangelizan misiadojn. Fine kard. Willebrands esprimis dankon al la eks-sekretario de la konsilio, past. Carson Blake, kaj adresis varman saluton al la nova ĝenerala sekretario, past. Potter, konfirmante la sinceran volon kunlabori kun li en la spirito de Kristo.

LA SANKTA SIDEJO INVITIS la nederlandan episkoparon haltigi la starigon de la nacia paŝtista konsilantaro. Sekve de tio la nederlanda episkoparo komunikis, ke la unua sesio de la tutnacia paŝtista konsilio, kreita en aŭgusto de 1971a, kiu devus disvolviĝi de la 6a ĝis

la 8a de oktobro, ne okazos. Laŭ la nederlanda presagentejo KNP, la Sankta Sidejo timas, ke la episkoparo, per la paŝtista nederlanda konsilio povas esti malhelpata en sia tasko pri instruo kaj direkto, kiun ĝi ricevis de Kristo mem pere de la papo. Komunikante la dispozicion, la nederlandaj episkopoj substrekis, ke la dialogo inter ili kaj la aliaj membroj de la eklezio daŭros, por konkretigi la orientiĝojn de la Dua Vatikana Koncilio rilate al la respondecoj de la tuta dia popolo. La episkopoj aldonis krome, ke la temo elektita por la unua sesio "justeco en la mondo" havas tian gravecon, ke ĝi postulas tutnacian dialogon en la nederlanda eklezio.

LA HISPANA KOMITATO por la "Kampanjo kontraŭ malsato en la mondo" informis, ke la monsumo kolektita en la lando dum la 13a kampanjo, atingis 110 milionojn da pesetoj, t.e. ĉirkaŭ 900.000.000 da italaj liroj. La komitato konstatis, ke ĉijare estiĝis en la kolekto pliigo de 27 milionoj da pesetoj kompare al la ĵus pasinta jaro. De 1939a ĝishodiaŭ la hispanaj diocezoj kontribuis al la papaj pormisiaj entreprenoj per pli ol du miliardoj da pesetoj. La informo estis donita de la hispana episkoparo, okaze de la 50a datreveno de la misiaj entreprenoj, kiu okazas ĉijare.

EN MADRIDO, LA 13an de junio estis ordinitaj tridek novaj sacerdotoj apartenantaj al "Opus Dei", el pluraj mondpartoj. Inter ili la itala inĝ. Francesco D'Agostino, 41jara, kiu eniris tiun instituton antaŭ sia doktoriĝo. En Milano li fondis la porkonstruan societon "Ticino", kies unika administranto li estis. Laŭ komisio de la ĉefep. de Milano, la entrepreno konstruis dum dek jaroj, interalie, centojn da malgrandaj sed belaspektaj loĝdomoj por malriĉuloj. Estas konate, ke "Opus Dei" estas instituto kanone aprobita, por ke en ĝi povu travivi la "perfektiĝan staton", tio estas la religian vivon

kun la kutimaj religiaj votoj, personoj, kiuj praktikas kaj daŭrigas praktiki sekularajn profesiojn. Inĝ. Francesco D'Agostino troviĝas en Nederlando, kie li kun kel kaj aliaj zorgos pri la starigo de la sama eklezia instituto.

INTER LA MULTAJ KAJ ĈIAM variaj atestoj de la intensa religia vivo en Pollando, aparte menciindaj estas la celebradoj honore al beata Kolbe kaj al Maria ĉielenprenita, en la "urbo de la Senmakula Virgulino", apud Varsovio, Niepokalanów, la urbo fondita de la beatulo mem en 1929a kaj de li pligrandigita per mirinda disflorado de entreprenoj honore al Maria. Oni disvolvis tie mariologian kongreson laŭ la doktrino de la beatulo. Prelegis teologoj kaj mariologoj de la katolika universitato de Lublino, de la katolika akademio de Varsovio, profesoroj de pluraj seminarioj kaj rektoroj de mariaj sanktejoj. Por la fidelularo oni pretigis manifestaciojn pli taŭgajn kun projekcioj de filmoj.

La kulmina momento de ĉi tiuj celebroj estis la lasta junia dimanĉo, je kies preparo dum semajno viciĝis miloj kaj miloj da fideluloj de ĉiuj polaj diocezoj, gvidataj de siaj episkopoj kaj de reprezentantoj de la religiaj institutoj: franciskanoj, dominikanoj, bazilanoj, jesuitoj, redemptoristoj, salezanoj, palotanoj, orionanoj, paŭlanoj. Por ĉiu tago estis asignitaj apartaj preĝintencoj: por la firmigo de la paco en la mondo, por la sankteco de la geedza vivo kaj la kristana ĝojo en la familioj, por la religiaj sacerdotaj kaj misiistaj vokiĝoj; por la rekta uzado de la sociaj komunikiloj, por la alveno de la dia regno helpe de la Senmakulino, por la sanktigo de ĉiuj. En la unua solena pontifika liturgio celebris kard. Wojtyla; en la dua kard. Wyszynski kun 35 episkopoj el ĉiuj polaj diocezoj. Ĉi tiu, per la evangelia parolo:" la semo, kiu falas sur la teron, devas unue morti, por doni siajn fruktojn", indikis en la beatulo tiun, kiu mem-

vole donis sian vivon por sia proksimularo, sed ĝuste pro tio hodiaŭ li lumas alte en la ĉielo de la eklezio, dum ĝia semo fruktas centoble. Alia granda katolika evento estis en la 26a-27a de aŭgusto, okaze de la festo de la Madono de Ĉestoĥovo, Reĝino de Pollando. La plej multenombra amaso da fideluloj venis de Varsovio kun la tradicia pieda pilgrimado, kiu de 256 jaroj ripetiĝas, de la pola ĉefurbo ĝis la maria sanktejo. Ĉeestis inter ili multaj fideluloj venintaj de eksterlando, inter kiuj, je la unua fojo 60 hispanaj pilgrimantoj. La spektakla popolamaso atingis la nombron de duonmiliono da personoj. Matene celebris solenan diservon la episkopo de Ĉestoĥovo, mons. Stefano Barela. Dum la celebrado kard. Wyszynski en la homilio reliefigis la rolon de la tre sankta Virgulino en la vivo de Jesuo kaj de la eklezio. En la posttagmezaj horoj la centoj da miloj da fideluloj recitis kune la rozarion kaj partoprenis en eŭkaristia procesio ĉirkaŭ la sanktejo, gvidata de mons. Tadeusz Szwagrzyk, helpepisk. de Ĉestoĥovo. Fine, per la vespera meso, celebrita de mons. Jan Zareba, episk. de Włocławek, konkludiĝis la solenoj honore al Maria Ĉielenprenita kaj al Patro Kolbe.

LA AFRIKA KONTINENTO estas vastega mozaiko de realoj kaj de problemoj: 345.676.000 da loĝantoj, disertigitaj kaj kunigitaj laŭ 850 etnoj, parolantaj pli ol 850 diversaj lingvoj; 54 ŝtatoj, el kiuj pli ol 30 fariĝis sendependaj post la 1960a jaro; kun demografia kresko de 2,7 procentoj. Laŭ la politika starpunkto, dum dekjaro da sendependo, okazis pli ol 30 ŝtatrenversoj. Estas rimarkinde, ke ofte tiu sendependo favoris nur kelkajn privilegiitajn kategoriojn. Fakte, pli ol la duono de ĉi tiuj ŝtatoj estas inter tiuj, kiuj havas la plej malaltajn enspezojn por persono en la mondo. La politika situacio de Sudafriko kaŭzas zorgojn pro la rasaj diskriminacioj, dum la analfabetismo atingas mez-

nombre 80 p.c.; kaj la porcio de morteco estas 22 por mil. Dum en Eŭropo troviĝas unu kuracisto por mil loĝantoj, en Afriko troviĝas nur unu por 50.000! La katolikoj estas 37.911.000 (preskaŭ 10 p.c. de la loĝantaro). Oni antaŭvidas, ke ili estos 175 milionoj en la 2000a jaro. La protestantoj, inkluzive de aliĝantoj al kristanaj sendependaj eklezioj, estas 24 milionoj. Kune kun la katolikoj, la kristanoj estas do 62 milionoj: 26 p.c. de la loĝantaro. Masiva ĉeesto de misiistoj datiĝas nur de la dua duono de la pasinta jarcento. Hodiaŭ la totalo de sacerdotoj en Afriko estas 17.684. Al tiuj oni devas aldoni 4.500 religiajn fratojn kaj 30.000 fratinojn, grand parte eksterlandajn. En la respubliko de Zairujo estis baptitaj dum unu jaro 144.460 adoltoj; en Niĝerio 84.136; en Ruando 72.400; en Ugando 53.764. La ŝtatoj kun la plej alta p.c. da katolikoj estas: Verdakaba insularo: 98 p.c.; insuloj Sejĉeloj: 97 p.c.; ekvatora Gvineo 79,9 p.c. Kaj tiuj kun la plej alta nombro da katolikoj estas: Zairujo 8.257.000, Ugando 3.243.000, Niĝerio 2.856.000, Tanzanio 2.527.000, Angolo 2.389.000. La ŝtatoj kun la plej alta nombro da aŭtoktonaj pastroj estas: Zairujo 642, Tanzanio 414, Sudafriko 354, Ugando 300, Niĝerio 221. Zairujo estas ankaŭ tiu, kiu havas la plej grandan nombron da afrikaj episkopoj: 26. Sekvas: Tanzanio 12, Ugando 8, Kameruno, Niĝerio, Voltio 6, Madagaskaro kaj Sudafriko 5. La eklezio trovas ĝenerale en Afriko favoran medion por la misia agado, ĉar la pagana mondo per sia kredo je la Plejalta Estulo, kreinto de la mondo, premianto de bono kaj ĝusta venĝanto de la malbono, estas grundo, en kiu la kristana kredo facile enradikiĝas. Ek de la komenco de sia aktiveco, kaj la katolikaj kaj protestantaj misiistoj zorgis por efektivigi multajn sociajn organizojn: lernejojn, dispensariojn, hospitalojn, ktp. Kiam, ĉirkaŭ la 1950a oni komencis percepti la unuajn simptomojn de sendepen-

deco, kelkaj anoncis la baldaŭan finon de la misiista agado en Afriko pro la opiniata koluzio kun koloniismo. Sed tiuj profetaĵoj montriĝis falsaj. La eklezio jam de longe, kvankam kun prudento, perfektigis proceson de afrikigo de la kadroj. Nun la plejparto de la episkopa hierarkio estas afrika. La afrikaj episkopoj estas 140 el 293, inter kiuj 4 haŭtnigraj kardinaloj. Signifoplena estas la kontribuo de la afrikaj episkopoj al la Dua Vatikana. Dum okaze de la unua Vatikana Koncilio neniu negra episkopo ĉeestis, en la Dua Vatikana ili estis preskaŭ cent. Ankaŭ la rolo de la afrika laikaro en la eklezio fariĝis pli konsista kaj decida. Sufiĉas memori pri la ekzemploj de maturiĝo donitaj en la tutafrika kaj malagasa kunveno de Akro (Gano) en 1971a. En la "Laikula konsilantaro" kaj en la papa komisiono "Justeco kaj Paco", la du vatikanaj organizoj por la laikaraj problemoj, Afriko estas bone reprezentata. La ĵusa Tria Simpozio de la episkopaj konferencoj de Afriko kaj Madagaskaro, okazinta en Kampala (Ugando), pristudis funde ĉi tiun temon: "La klopodoj de la laikaro por la kresko de la eklezio kaj por la tuteca progreso de Afriko". Afriko estas la kontinento, en kiun Jesuo, lia patrino kaj Jozefo rifuĝis dum persekuto. Ankaŭ ni povas do rigardi Afrikon, kiel kontinenton, en kiu la eklezio metas siajn plejn grandajn esperojn.

INTERNE DE ANGOLO (LA PORTUGALA kolonio kun 12.500.000 da loĝantoj) ekzistas de la 1958a jaro la trapista monakejo "Sankta Maria de Belavista". Ĝin fondis du monakoj de la hispana trapo de Duenas, kaj ĝi gastigis baldaŭ grupon de naŭ religiuloj. Estas konate, ke la trapista vivo estas regata de unu el la plej severaj reguloj, tiel ke malmultaj kapablas ĝin elteni. Nun tiu monakejo havas tridekon da monakoj, el kiuj 14 afrikaj. 35 junuloj en aparta konstruaĵo sin pretigas por esti akceptataj kiel postulantoj. En la teritorio de la trapo es

tis ankaŭ konstruita lernejo kaj internulejo kun ĉirkaŭ cent knaboj, gvidata de monako. La angola trapo fariĝis por la tuta lando centro de spirita disradiado. Laŭ sia kontempla vokiĝo la trapistoj evitas animzorgan aktivecon, sin dediĉante entute al preĝado, kontemplado, pentofaro kaj manlaboro. Per ĉi tio ili ne nur vivtenas sin, sed ili loĝigas la lernantojn senpage, kiel ankaŭ 24 knabinojn de la virina internulejo; kaj helpas centojn da malriĉuloj. La loĝantaro nomas ilin: la sanktuloj de Dio. Ilia tasko estas atesti per sia vivo la dian transcendon kaj preĝi por la konverto de la tuta Afriko. Ili per sia severmora vivo, asertis p. Alberto, prioro de la trapo de Bela Vista, dum sia vizito al Romo, pruvas, ke la mistera sento de sakreco, enradikita en la afrika karaktero, logas la afrikanon al Kristo, precipe per la sakramentoj de la bapto, pento kaj eŭkaristio. Fakte inter ili, liturgio, procesioj, la komunumaj piaj praktikoj estas alte taksataj. Tio ne signifas, ke en ĉiu afrikano estas emo al monakismo. Tamen ĉe ili troviĝas ne malmultaj, kies toleremo kaj simpleco estas ŝirmo kontraŭ la maltrankviloj de la nuntempa vivo, kaj oni dirus, ke ili estas laŭnature altiritaj al mistikismo".

EBURBORDO ESTAS UNU EL la ne multaj afrikaj ŝtatoj, kie la ekonomia situacio eltenis, kaj dum ĉi tiuj lastaj jaroj, iom post iom eĉ pliboniĝis. Tamen ĝi estas lando de kontrastoj. El unu flanko la internaj regionoj, la tradicia Afriko kun ĉiuj misilandaj karakteroj; el la alia flanko la marbordaj urboj, la sama vivo de la grandaj urbaj centroj de Eŭropo aŭ de Ameriko. Tiel same estas ankaŭ la multaj problemoj politikaj, sociaj kaj religiaj. Sufiĉas rigardi la fenomenon de la urbanizo en ĉefurbo Abidjan, kiu el 22.000 loĝantoj de 1940a atingis la nombron de 200.000 en 1960a, ĝis la aktuala de 500.000. El la ok diocezoj de Eburbordo, kvin estas ad

ministrataj de aŭtoktonaj episkopoj, kvankam la historio de la eburborda eklezio estas sufiĉe freŝdata. Fakte nur en 1955a estis starigita la eklezia hierarkio en tiu lando per la unuaj kvar diocezoj. Sed nur en 1960a, la jaro de la sendependo de la ŝtato, ĝi havis sian unuan aŭtoktonan episkopon, mons. Yago, ĉefep. de Abidjan. La kristana vivo aperis en tiu lando en 1914a,sed la unuaj progresoj datiĝas de la tempo inter la unua kaj la dua tutmonda milito. Hodiaŭ ĝi havas sescent mil katolikojn kaj la nombro de la baptoj daŭre kreskas. La evangelizado en la kamparo, kie la loĝantaro estas pli stabila, sed kie ĝi luktadas kontraŭ la mizero, estas tute alia, ol tiu de la urboj, kie okazis amasa alfluo da eksterlandaj laboristoj, kiuj jam estas pli ol miliono. Ĉi tiuj, kiuj estis altiritaj per la promeso de facilaj gajnoj, nun estas forlasitaj, kaj ofte senesperaj. La eburborda eklezio klopodas asisti ĉiujn suferantojn en urboj kaj en vilaĝoj, kaj pristudas la plej taŭgajn rimedojn por pliigi la nombron de siaj laboristoj, sacerdotoj kaj fratinoj, kiuj fakte kreskas, sed bedaŭrinde ne laŭ la ritmo de la ĉiam premantaj necesoj.

SITUACIO KAJ PERSPEKTIVOJ de la eklezio en Malio. Antaŭ pli ol okdek jaroj, en la 1895a, la Blankaj Patroj venantaj de Senegalio eniris en la francan kolonion el la okcidenta Sudano, fondante en Segou la unuan katolikan mision. Poste, dum la unua duono de la dudeka jarcento la francaj misiistoj iom post iom plivastigis sian ĉeston kaj aktivecon en tiu afrika lando entute komisiita al iliaj apostolaj zorgoj. Nun, dank'al iliaj klopodoj, en tiu vastega teritorio de 1.240.000 kv.km., fariĝinta sendependa en 1960a kun la nomo Malio (el antikva samloka imperio), oni povas aserti, ke la eklezio havas tie fortikajn bazojn. Ĝi ne atingis, verdire, grandiozajn sukcesojn en la evangeliza kampo: el ĉirkaŭ 5.000.000 da loĝantoj troviĝas nur 50.000 katolikoj,

dum 64 procentoj estas muzulmanoj kaj 34 p.c. animistoj; sed ĝi metis bazojn por plia avanco, precipe inter animistoj. Ĉefe dum la lastaj dudek jaroj estiĝis gravaj efektiviĝoj pri la eklezia organizado. Fakte en 1955a la apostola vikariejo de Bamako estis rangaltigita al metropola ĉefdiocezo kaj konfidita al la loka klerikaro. Estis ankaŭ kreitaj en '62a la diocezo de Ségou; en '63a, de Kayes kaj Sikasso; en '64a de Mopti, kaj fine en '65a de San, dum la unua episkopo malia, mons. Luc Sangaré estis elektita ĉefepiskopo de Bamako. En la sama tempo la nombro de sacerdotoj kaj religiaj helpantoj triobliĝis: 209, krom cento da fratinoj. Ankaŭ la misiaj stacioj estas sesdeko. La malia eklezio havas nun tri malsuperajn seminariojn. La progresintaj seminarianoj daŭrigas la kursojn ĉe Koumì, en la proksima Voltio. La 23an de aŭgusto estis subskribita konvencio inter la katolika eklezio, reprezentita de la ĉefep. de Bamako, kaj la ministro por la edukiĝo, Yaya Bagayaoko, por la oficiala kuniĝo de la katolika lerneja reto al la sistemo de la instruado en la respubliko.

EKDE LA UNUA ESPLORADO de la Nova Gvineo per la portugala Nuno Tristao, la francaj franciskanaj misiistoj komencis tie sian evangelizadon. En ĉi tiu terangulo de la okcidenta afrika marbordo, situinta inter la respubliko de Gvineo kaj Senegalio, la apostola agado de la misiistoj ĉiam estis malfacila pro la klimato kaj la tradiciaj kredoj tipaj de la afrikaj popoloj. Tamen je la fino de la 16a jarcento estiĝis jam pluraj kristanaj komunumoj kun multaj preĝejoj kaj konsiderinda nombro da katolikoj. Nuntempe la portugala Gvineo estas, el la eklezia vidpunkto, Apostola Prefekturo, en kies administrado mons. Amandio Neto respondas pri la evangelizado de preskaŭ duonmiliono da animoj, kiuj konsistigas la tutan loĝantaron de ĉi tiu portugala provinco. La

plejparto de la popolo estas animista; sed 36.000 katolikoj reprezentas notindan kvanton por ĉi tiuj lokoj. Freŝdataj statistikoj rilatantaj la ĵus pasintan jaron, informas, ke aldoniĝis al la citita nombro da katolikoj 1.300 baptoj, dum 6.300 estas la katekumenoj. Estis konstruitaj 15 preĝejoj kaj 15 kapeloj. 82 estas la lernejoj, frekventataj de pli ol 10.000 lernantoj, instruataj de 175 katolikaj instruistoj. La apostola agado rilatas multajn asistajn entreprenojn, kiuj permesas helpi al la necesoj de la loĝantaro, kunigita ĉefe en la grandaj centroj de Bissau, Teixeira Pinto, Mansoa kaj Bissorà.

JE LA UNUA FOJO ĉijare en Usono la Porreligia Instrua Semajno havos interreligian karakteron. La manifestacio, kiu disvolviĝos de la 24a de septembro ĝis la 1a de oktobro estas enkondukata de la Asocio por la religia instruado de Usono kaj Kanado. La lasta septembra semajno, jam de kelkaj jaroj estis dediĉita de la protestantoj al organizado de la tiel dirita Semajno por la Kristana formiĝo, dum la katolikoj festis en la lasta dimanĉo de la sama monato, en ĉiuj preĝejoj, la Katekizan Tagon. Ankaŭ la hebreoj dediĉas unu tagon de la sama periodo por la festo de la religia instruado. Je la unua fojo ĉijare la manifestacioj estos kunigitaj, iniciate de la dirita organizo, kiu fiksis ĉi tiun temon: "Krizoj kaj esperoj en la religia instruado", kaj invitis instruistojn kaj lernantojn de ĉiuj preĝejoj kaj sinagogoj reciproki inter si vizitojn, interŝanĝante ideojn pri la edukaj problemoj.

LA PERMANENTA DIAKONECO akiras rolon pli kaj pli gravan en la eklezia vivo de la Latina Ameriko. Ses nacioj (Brazilo, Ĉilio, Paragvajo, Dominika Respubliko, Peruo kaj Urugvajo) havas jam plurajn permanentajn diakonojn. Ĉe aliaj ŝtatoj la respektivaj episkopaj

konferencoj aprobis la institucion: Argentino, Bolivio, Kubo kaj Venezuelo. En Paragvajo oni jam preparas 63 volontulojn 35-50jarajn. Aliaj kvarmonataj kursoj komenciĝos en ĉi tiu jaro mem. La partoprenantoj enprofundiĝas aparte la temojn: popola religieco kaj kredo; politika realo; krom pluraj liturgiaj kaj paŝtistaj temoj. Ankaŭ en Portoriko la permanenta diakoneco estas en la centro de la konsideroj de la episkoparo, kiu pri tio ĵus donis kelkajn normojn. "La kandidatoj - estas inter alie deklarite - havu aĝon inter 35 kaj 55 jaroj, kaj, se ili estas edzoj, ili jam de dek jaroj estu edziĝintaj. Ĉe la fino de 1971a en la tuta mondo estis 339 permanentaj diakonoj, dum ili estis 150 en 1970a. La novaj kandidatoj estas verŝajne pli ol 2.000.

## AMO AL KRISTO EN LA HEJMO POR LA MORTANTOJ

"...Amu vian homfraton, kiel vin mem".(Mat. 22:40.)

Ni, ĉiuj kristanoj, bone konas tiun ĉi ĉef-ordonon de Nia Sinjoro, sed pensante pri ĝi tuj altrudiĝas ankaŭ la demando: - Ĉu ni obeas ĝin kaj, se jes, kiomgrade? Ĉu tute aŭ nur tiom, kiom ĝi estas "konvena"por ni? - Ni estas emaj multfoje tiel respondi, ke "neeble" estas plenumi ĝin tiel, kiel nia Savinto ordonas! Ni estas hipokrituloj, same kiel la fariseoj, dirante tiel! Ĉar la ordono estas plenumebla eĉ en la nuna, moderna mondo, se oni havas la veran Amon ... kaj Volon! Multaj, nun vivantaj filinoj de Kristo pruvas tion per siaj ekzemploj (1):

Certa nombro da Fratinoj el diversaj kongregacioj, kiuj iris en Hindujon por helpi la rifuĝintojn el Bangla

---

(1) La sekva artikolo estas tradukita el "Zealandia", semajna gazeto de la nov-zelandaj katolikoj, publikigita en la rubriko: "La aganta Eklezio".

deŝo, nun jam vivas kaj laboras kune kun la Misiaj Fratinoj de Karitato, la Societo de Mater Tereza. Unu el tiuj monakinoj, Fratino Mary Lou Theisen, IHM, skribis:

"Mi laboras parte en Kalighat (Hejmo por la Mortantoj) ĉiutage kvar-kvin horojn matene kaj poste mi instruas en du klasoj la Sanktan Skribon. La laboro en Kalighat estas fizike malfacila kaj kelkfoje forte emocia, sed eksterordinare rekompencanta. Kvankam ĉiu persono, kiun oni portas al Kalighat estas en mortanta stato, tamen la hejmo reale estas multe pli, ol nur hejmo por mortantoj. Ĝi estas kombinaĵo-centro por maljunuloj, por spirite-mankaj, por danĝere malsanaj same kiel por la mortantoj. La farto de tiuj, kiujn plej ofte la policistoj enportas, trovinte ilin sur la stratoj, estas nekredebla. Ni ofte uzas la esprimon "haŭto kaj ostoj", sed antaŭe mi neniam vidis envere, kion tio signifas. Multaj estas kovritaj per ulceroj aŭ ilia karno manĝita de malsano aŭ rekte de hundoj, kontraŭ kiuj ili jam eĉ ne kapablas defendi sin. La fratinoj klopodis fari ĉion eblan por helpi iun junan virinon, sed ŝi jam troviĝis en senespera stato. Ŝia morto estis belega. Ŝia edzo apud ŝi estis dum la lastaj du tagoj, karesante kaj instigante ŝin por manĝi kaj trinki. Kiam li konstatis, ke la fino proksimiĝas, li ploris kiel malgranda infano. Tiam li refortigis sin por plenumi la lastan riton de hindua edzo. Li donis al ŝi la lastan guton de akvo por trinki, lavis ŝian vizaĝon kaj donis la permeson al ŝi por la forpaso. Tiam li turnis sin dankante al ni, kiuj staris apud ili, kaj transdonis al ni ŝian lastan benon, tuŝante niajn piedojn kaj poste ŝian kapon per sia dekstra mano..."

Tio estas vero, ke kion la Fratinoj de Mater Tereza faras ĉi tie, ne solvas la gigantan problemon de la hinduoj, kiuj naskiĝas, vivas kaj mortas sur la stratoj. Mater Tereza neniam imagis, ke ŝi povus solvi tion. Tiu ĉi problemo estas tro granda por unu individuo aŭ or-

ganizo. La registaro klopodas, kaj kiujĉi tie laboras jam pli longan tempon, vidas ke estas progreso. Tamen, dumtempe la opaj individuoj bezonas la amon, la respekton, prizorgon kiel homaj estaĵoj. Tio ĉi estas, kion Mater Tereza kaj ŝiaj Fratinoj klopodas transdoni pro amo al Kristo, kiun ili vidas en tiuj ĉi suferantaj kaj mortantaj personoj".

Auckland, Nov-Zelando. Trad. J. Hamvai

PATRINO TEREZA, LA ALBANDEVENA fratino, fondintino de la "Misiistinoj de la Karitato", kiu en 1970a estis insignita de Paŭlo 6a per la porpaca premio "Johano 23a" (v.K.S.1971,n.2), ricevis ankaŭ novan ateston, la "Premion Nehru por la internacia komprenemo". La deklara motivo asertas, ke patrino Tereza "donis al la mondo unu el la plej admirindaj ekzemploj de karitato, stimulante grandan nombron da personoj sindediĉi al malriĉuloj, al forlasitoj, al forgesitoj. Tia senlaca kaj senprofita zorgo por tiu nobla celo, reprezentas imitindan homaman ateston". Estas ankaŭ substrekita la kontribuaĵo donita de patrino Tereza al "la progreso de bona volo, de amikeco kaj interkompreno de la homaro sur nia tero.". Aparte estas menciita ŝia sindona kaj seninterrompa agado en la ĵus pasinta jaro por mildigi la suferojn de rifuĝintoj de Bangladeŝo. La premio "Nehru" estis kreita en 1964a kaj estas asignita de la hinda instituto por la kulturaj kaj fratecaj interrilatoj. Dum la pasintaj jaroj ĝi estis asignita al konataj eminentuloj, inter kiuj al la eks-ĝenerala sekretario de UNO, U Thant, kaj al Martin Luther King.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZO: £. 1.000 (Us. dol. 1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C.C.Ferrari
aŭ pĝk al: 1-37638 - P. Giacinto Jacobitti

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo